

# TEA-BULTENO

3<sup>a</sup> JARO

MAJO 2000

NUMERO 5



## AGENDO



## TRIESTO 2000

### Placo Unuiĝo de Italio

*Triesta placo ricevis printempan, portempan veston!*

*Antaŭ ties renovigo, la triesta estraro volis, ke ni kune adiaŭu ĝin per konkreta kontribuo: ĉiuj triestanoj estis alvokitaj farbi la placon laŭ la desegnaĵo farita de la pentristo Bruno Chersicla.*

*Jen kiel la triesta artisto priskribis kaj klarigis sian verkon (9<sup>an</sup> de marto 2000).*



La pentraĵo, kovranta la placon, simbole inspiriĝas el historia pasinteco de Triesto kaj ties ekonomia aspiro kiel pordo direkte al Oriento.

La desegnaĵo reprezentas Eŭropon kaj Trieston: ĝi estas enkadrigita en pordo kun orient-forma arko, en kiu Orienton signas ankaŭ la Leviĝanta Suno kaj la Lunarko, dum la flavaj steloj en lazura fono aludas pri la flago de Eŭropa Unio.

La simbola prezento, estigita de l' memoro pri la antikva mitologio, montras virinon, armitan per halebarda lanco (Triesto) kaj rajdantan taŭron kiu ŝin kondukas al la maro. Tio ĉi celas indiki la volon de la urbo sin proponi kiel protagonisto sur la scenejo de Eŭropa Komunumo.

La dimensioj de la verko, etendiĝanta eĉ preter la altaĵo de la centra surfaco, egalas al 72 metroj oble 144, nome entute 10.368 kvadrataj metroj. Por ĝin realigi oni utiligos laveblajn akvo-farbojn, kiujn oni ŝmiros en difinitaj zonoj nigrakolare konturitaj: ĉiuj, kiuj emos improvizite roli kiel pentristoj, povos en ĉi laboro partopreni, postlasante tiel sian subskribon sur la verko.

Pro la giganta formato de la pentraĵo kaj pro la kunlaborado de tiom da volontuloj, oni povas ĝin konsideri aŭtentika krea agado, plenumita ene de tre limigitaj tempo kaj spaco, destinita ekzisti nur en la tempodaŭro necesa por ties efektivigo: ĝi malaperos, lasante en la roluloj la memoron kaj en la ceteraj fotografan «dokumenton» pri la verkaĵo. Ĉi-kaze, dum la farbado ĉiu el ni pentros mozaikeron, sen havi ideon pri la tuto, eventuale ĉerpante el memoro la kompletan vidaĵon de la grafikaĵo: sed dum la labormomentoj oni sin dediĉos nur al «propra» plac-ero. Nur je la fino, ĉiu parto eniĝos en la finan komponaĵon kaj la rezulton eblos kontroli nur de supre, de la alto.

Provoke oni uzis la terminon «skrapdesegnaĵo» (*graffito*), ĉar, antaŭvide de la estonta renovigo de tiu historia placo, oni ja preskaŭ rajtas ĝin nunamomente transformi, ĝuste pro la portempeco de tiu ellaboraĵo, alimaniere neniel realigebla.

1 L

2 M Ordigo de TEA-arkivo

3 M

4 Ĵ

5 V FLOROJ KAJ BESTOJ

6 S

7 D

8 L

9 M Ordigo de TEA-arkivo

10 M

11 Ĵ

12 V Ŝatata gasto: La kolbaseto de Ferrara

13 S

14 D

15 L

16 M Ordigo de TEA-arkivo

17 M

18 Ĵ

19 V Legaĵoj el LA ESPERANTISTO (1889-1895)

20 S

21 D

22 L

23 M Renkontiĝo kun Geoffrey GREATREX

24 M

25 Ĵ

26 V KVIZA VESPERO: KIU KAJ KIE?



27 S

28 D

29 L

30 M Ordigo de TEA-arkivo

31 M



*La pentraĵo, farita de pli ol 5000 personoj, inter kiuj ankaŭ TEA-anoj, estos videbla ĝis la duono de majo, poste oni komencos la laborojn de repavimado, kiuj daŭros pli-malpli unu tutan jaron. Kiu estas interesita vidi la bildon, tiu povas viziti la ejon: [www.comune.trieste.it](http://www.comune.trieste.it)*

## TRADICIA RENDEVUO

La Centra Oficejo de UEA en Roterdamo invitas al sia Malferma Tago, kiu okazos sabate, la 13<sup>an</sup> de majo, ekde la 10<sup>a</sup> ĝis la 17<sup>a</sup> horo. La ĉefgasto de la 12<sup>a</sup> MT estos la konata movada aganto, eseisto kaj oratoro **Gian Carlo Fighiera** el Italio. Post ofico de Konstanta Kongresa Sekretario de UEA (1956-1961), Fighiera faris longan karieron en la internacia turismo kaj kongres-organizado, fine kiel alt-ranga oficisto de Monda Turisma Organizo. Sian multflankan movadan aktivadon li daŭrigis i.a. kiel prezidanto de la eldona societo **HEROLDO DE ESPERANTO**, ekde 1961 estrarano de UEA kaj en aliaj taskoj. En la Malferma Tago li prelegos pri “La obstakloj kaj ŝancoj survoje de Esperanto en la nova jarmilo”.

Ankaŭ ĉi-foje ne mankos senpaga loterio, bazaro de esperantaĵoj, montrado de Esperanto-filmoj, kafumado kaj teumado. Kiel kutime, la libroservo regalos siajn klientojn per rabatitaj prezoj.

## TEL-AVIVO superis la unuan milon

La 85<sup>a</sup> Universala Kongreso en Tel-Avivo nombris, je la 12<sup>a</sup> de aprilo, 1030 aliĝintojn el 51 landoj. Sekve la ĉi-jara UK lasis malantaŭ si la du solajn UK-ojn post la dua mondmilito kiuj havis malpli ol mil aliĝintojn: Portlando 1972 (923) kaj Vankuvero 1984 (802).

La lastatempa akceliĝo de la aliĝritmo promesas bonan ŝancon, ke la Tel-Aviva UK grimpos ankoraŭ pli supren en la postmilita kongresa statistiko. Por tio ĝi devos preterpasi almenaŭ la Rejkjavikan UK de 1977, al kiu aliĝis 1199 kongresanoj. Poste sekvas Adelajdo 1997 (1224), Kopenhago 1975 (1227), Ateno 1976 (1266) kaj ankaŭ la UK en 1967, celita okazi en Tel-Avivo sed translokita al Roterdamo (1265).

## DONU ŜANCON AL PACO: VENU AL LA MEZA ORIENTO!

*RENATO CORSETTI*

Zamenhof iam parolis pri «ŝipo, kiu portis la admiralan flagon sur la masto». Tiun ŝipon oni nomas en Esperanto kaj “flag-ŝipo” (laŭ la angla modelo) kaj “admirala ŝipo” (laŭ la eŭrop-kontinenta modelo).

Se al tio oni aldonas ke “admiralo” estas arab-devena vorto en Esperanto [al-amir = la estro (de la maro)], ni jam troviĝas en la Meza Oriento kaj en la tuta problemaro de la Universala Kongreso en Telavivo.

Laŭ la ĵargono de UNESKO “flag-ŝipa evento” estas io, kion en Esperanto ni pli klare nomus “voj-montra evento”. La fakto ke UNESKO decidis doni al la Universala Kongreso en Telavivo la rajton esti unu el tiuj *voj-montraj eventoj* de la jaro 2000<sup>a</sup>, «la Internacia Jaro de Kulturo de Paco», ankaŭ estas en si mem fakto voj-montra por la esperantistoj.

Same voj-montra estas la fakto, ke reprezentanto de UNESKO decidis mem paroli pri tiu temo dum la UK, kaj la

fakto, ke la estraro de UEA dediĉis la kongresan temon al «Lingvo kaj Kulturo de Paco».

Kiel vi vidas “paco” estas la centra elemento de ĉi tiu kongreso. Se oni multe parolas pri **paco**, la kialo estas, ke paco ankoraŭ ne ekzistas en la mondo kaj precipe ne en la Meza Oriento.

Oni devas daŭre strebi por konservi pacon. Ĝi ne estas situacio, kiu mem-konservas sin. Tiu strebado estas unu el la gravaj elementoj de la agado de esperantistoj. Ne necesas doni detalojn, ĉar ĉiu, ankaŭ novaj esperantistoj, jam aŭdis pri la kunligo inter Esperanto kaj paco, almenaŭ oni aŭdis, ke «nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos».

Paco, aliflanke, kiel mi jam aludis, postulas penan intertraktan laboron, ĉar ĉiu konsentas pri la ĝenerala principo: «Paco kaj Esperanto estas bonaj aferoj», sed tiu konsento tuj malaperas kiam oni venas al konkretaĵoj: «Por atingi pacon, vi devas pagi plimulte vian benzinon», «Por lerni Esperanton vi devas aĉeti lernolibron kaj trastudi ĝin».

En la kazo de la Meza Oriento la situacio estas tiom komplika, ke apenaŭ homoj, ekster tiu regiono, komprenas ĝin. La facilaj skemaj ideoj, kiel «Israelo estas lando moderna kaj demokratia», «Israelo estas lando agresema, kiu ne respektas la homajn rajtojn», «Araboj estas ĉiuj teroristoj», «Araboj estas ĉiuj viktimoj de la usona politiko pere de Israelo», ne eltenas komparon kun la surloka realo.

La partoprenantoj en la UK povas mem sperti la situacion kaj formi al si personan juĝon. En ĉies argumentoj estas parta vero kaj parta malvero. Ĉiuj pravas kaj ĉiuj malpravas. Ĝuste pro tio la debatoj dum la UK ebligas senkaŝan komparon de tiuj vidpunktoj.

☞ Se vi partoprenos, vi rajtos finfine demandi la israelajn esperantistojn pri faktoj kaj opinioj, kaj vi rajtos formi al vi la viajn, preter la simpligitaj opinioj, kiujn puŝas al vi la amas-komunikiloj.

☞ Se vi partoprenos, vi havos la eblecon ankaŭ renkonti la alian flankon, la arabojn kaj en Israelo kaj ekster ĝi, kaj ankaŭ ilin vi povos demandi pri faktoj kaj opinioj. Ĉirkaŭ la kongreso estas pluraj eventoj (antaŭ-kongresaj ekskursoj, seminario en Amano de arabaj esperantistoj, ktp), kiuj ebligas al la kongresanoj kompari la vidpunktojn de la du flankoj.

Nia deziro estas, ke la esperantistoj kontribuu per sia ĉeesto kaj per siaj ideoj al la pac-procedo, kiu, preskaŭ kiel la Esperanto-movado mem, stagne antaŭeniras. Ni estos tie por diri, ke tiu procedo devas antaŭeniri (kaj vi vidos, ke granda procentaĵo de la israela loĝantaro samopinionas, same kiel samopinionas granda procentaĵo de la araba loĝantaro de la ĉirkaŭaj landoj).

Kompreneble ni ankaŭ lernos pri lingvo, la nov-hebrea, kies revivig-procedo estas la plej simila – inter ĉiuj lingvaj fenomenoj – al la vivig-procedo de Esperanto mem: de libra lingvo al vera lingvo, kaj ni ankaŭ lernos pri la araba lingvo, kiu nature prezentas skemecajn trajtojn, el kiuj planlingvistoj (kaj verkantoj de pli-malpli plenaj vortaroj) povos multon lerni.

Ni ankaŭ lernos pri la socilingvistika situacio en la Meza Oriento, kaj pri ĝia ebla kontribuo (kaj malkontribuo) al la pac-procedo: ekzemple, ĉu vi scias ke en jordanaj universitatoj oni instruas la nov-hebrean? Same

malmultaj scias, ke la instruado de la araba en israelaj lernejoj estas vasta kaj oni intencas pliefikigi ĝin, malgraŭ la premo de la angla.

Ne estas mia intenco paroli en ĉi tiu artikoleto pri la mult-kultureco kaj mult-lingveco de la regiono, nek pri ĝiaj turismaj allogaĵoj: pri tiuj, aliaj raportis jam abunde. Mi volas nur diri, fine, ke, kvankam Israelo estas lando, kiu per sia nura nomo tuj elvokas fortan simpation aŭ fortan malsimpation, vi ne rajtas simpatii aŭ malsimpatii sen rektaj informoj. Tiujn vi povos akiri per partoprenado en la unua grandskala Esperanto-evento en tiu regiono. La kongreso en Telavivo ne estas nur kongreso en Israelo, ĝi estas kongreso, kiu ebligas al vi koni la tutan Mezan Orienton.

Rimarku, fine, ke, ĉar esperantistoj (malgraŭ ĉiuj babiloj) vere interesiĝas, unuarange kaj profunde, nur pri disvastigado de Esperanto, kongreso en la Meza Oriento estas ankaŭ maniero alporti Esperanton al la tuta regiono. Mi komencas ricevi en la ret-poŝta listo mesaĝojn en vera Esperanto de veraj araboj, kaj la unuaj kontaktoj inter israelaj kaj arabaj esperantistoj komenciĝas. Vi eble memoras ke, en Montpeliero, vi decidis ke Esperanto estu ponto en ĉiuj komplikaj situacioj ankaŭ inter la nordo kaj la sudo. Tio en la Meza Oriento ekkazas inter mil malfacilaĵoj. Venu por helpi ankaŭ pri tio, kio en sia maniero estos originala kontribuo al la pac-procedo.

## Mallonge pri...



### E-kurso en televido

La hispana televidkanalo 54 prezentas Esperanto-kurson, gvidatan de s-ano **Marti Guerrero i Cots**. Ĝi okazos ĉiun duan semajnon kaj la partoj estas plurfoje ripetataj intertempe. La programo kapteblas en tuta Hispanio. La kurso komenciĝis la 2<sup>an</sup> de marto je la 16<sup>a</sup> horo. Leteroj de esperantistoj, ankaŭ hispanaj, estas bonvenaj por plifavorigi la kurson. La leteroj sendeblas al:

#### CANAL 54

Passeig Ferrocarrils Catalans 117-119

ES-08490 Cornellà de Llobregat (Barcelona) - Hispanio

### Instruisto bezonata de...


Esperanto-Ligo de Serba Respubliko en Bosnio-Hercegovino serĉas instruiston el eksterlando por konversacia nivelo dum Somera E-lernejo okazonta de la 14<sup>a</sup> ĝis 22<sup>a</sup> de julio.

Vojaĝbileton kaj restadon pagas la organizanto. Post la lernejo la instruisto povas senpage partopreni en la 5<sup>a</sup> renkontiĝo de Respubliko Serba (22-24 de julio) en Pale apud Sarajevo. Por aliaj informoj kontaktu la Ligon:

p. fah 335, BA-78000 Banja Luka

RS-Bosna i Hercegovina,

rete: mvrhovac@urcbl.urb.ac.yu



### ... mikologio

Giorgio Bronzetti serĉas informojn pri mikologiaj terminaroj aŭ tekstoj en Esperanto pri mikologio, por projekto pri E-lernolibro por tiuj fakuloj. Ret-mesaĝu al [bronzett@vega.chieti.com](mailto:bronzett@vega.chieti.com)

## Studo pri la esperantista paclaboro

UEA eldonis ĝisdatigitan version de la historia skizo de d-ro Ulrich Lins pri la kontribuo de UEA al paco. La nova 12-paĝa kajero, «La laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo», aperis en la Esperanta kaj anglalingva serioj de Esperanto-dokumentoj.

Antaŭenigo de paco kaj interkompreniĝo estas esenca parto de la agado de UEA ekde ĝia fondo, same kiel por Zamenhof la idealo de paco estis ĉefa instiganto por krei Esperanton. De la studo de Lins profitas ĉiu, kiu deziras profundigi sian konon pri la historio de Esperanto, ĉar en konciza formo ĝi provizas la leganton per multaj informoj.

La angla kajero estas utila informilo por distribuo inter ne-esperantistoj, ekz. dum konferencoj, foiroj kaj ekspozicioj, ĉar ĝi prezentas konkrete la laboron de esperantistoj kiel gravan socian agadon anstataŭ simpla hobia. UEA aperigos ankoraŭ francan tradukon de la kajero. Tradukoj al aliaj lingvoj, ekz. fare de landaj asocioj, estas tre dezirindaj.

Unuopa kajero en Esperanto aŭ angla kostas 2,15 eŭrojn. Ekde samtempa aĉeto de 3 ekzempleroj la libro-servo de UEA donas trionan rabaton.



## Malfermita letero

de Claude Pirlot

Al la demokratia partioj

Al batalantoj kontraŭ iu ajn diskriminacio

Oostende, 21.02.2000

Gesinjoroj! Lastatempe temas multe pri la ekstrema dekstro en Aŭstrio. Mi akordas kun la reagoj, sed ne kiam iuj malalte taksas ĉiujn Aŭstrianojn sendiference kaj volas sankcii la tutan loĝantaron de tiu lando. Tio estas ja sensenca, ĉar troviĝas ksenofoboj en ĉiuj landoj de la mondo. Tamen, granda plimulto de tiuj, kiuj emfaze paroladas pri la danĝeroj de la ksenofobio estas ĝenerale anoj, aktivaj aŭ pasivaj, de la glotofobio, kiu svarmas en la internaciaj rilatoj, tiu speco de senhonta diskriminacio kies bazo estas la lingvo.

Ĝis nun Eŭropa Unio evitis ĝin "de jure" kun 11 oficialaj labor-lingvoj, sed, pro la pligrandigo, kio altigus tiun nombron ĝis dudeko, oni pli kaj pli antaŭvidas limigi tiun nombron je tri: angla, franca kaj germana!

Aŭtomate tio signifas, ke la eŭropaj angle-france-germane-parolantoj estos pli respektablaj ol la aliaj "-lingvanoj". Ne al la ksenofobio; jes al la glotofobio! Dum renkontiĝoj inter Eŭropanoj, nur tiuj, kiuj parolas tiujn lingvojn rajtos esprimi sin tutlibere: jen bela demokratio! Tamen, kiaj estus la reagoj se, dum tiuj renkontiĝoj, iu proponus, ke nur la blonduloj, naturaj aŭ artefaritaj, havu la rajton paroli? Ĉu vi povus klarigi al mi, kiel oni povas dece kondamni la ksenofobion (rasismo bazita sur la etno) kaj samtempe kuraĝigi la glotofobion (rasismo bazita sur la lingvo)?

Mi antaŭdankas kaj sincere salutas vin,

Germain Pirlot - Steenbakersstraat 21 - BE-8400

Oostende - Belgio

\*\*\*\*\*

*Estus interese ekscii la reagojn al ĉi tiu letero! Kaj kiel aŭ kion respondus niaj, la italaj, deputitoj aŭ partianoj?*

# Jubileo 2000

## Esperantista Pilgrimado

### al Monto Lussari

Dimanĉon la 4<sup>am</sup> de junio



Ankaŭ ni deziras partopreni en celebrado de la fama Jubileo. Ideo kaj propono aperis febuare, okaze de Semajno de Internacia Amikeco; nun tio ĉi fariĝis konkreta plano: ekskurso al la Sanktejo de Monto *Lussari* (en *Valcarnale*, apud *Valbruna*). Al la aranĝo estas invititaj ĉiuj esperantistoj el la najbaraj landoj kaj regionoj, ne gravas ĉu de Alp-Adrio aŭ ne. **TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO** volas ke ĝi fariĝu, el simpla ekskurso sur monto, io pli enhavriĉa. Jen la programo, sekvu nin!

Oni atingos la supron, je 1789 metroj, per telfero. Tie spirhalta panoramo malfermiĝos antaŭ viaj okuloj: via rigardo povos libere flugi al Orientaj Alpoj, al Taŭroj, al Karintio. En la vilaĝeto, je oportuna horo, ni tagmanĝos.

La Sanktejo, kie, espereble, ni sukcesos celebri esperantlingvan Di-servon, estas unu el la plej famaj preĝejoj, dediĉitaj al Sankta Maria, ne nur de Friulo sed ankaŭ de Slovenio kaj Karintio. Jam de jarcentoj ĝi estis religia renkontiĝejo de aŭstroj, italoj kaj slovenoj.

Ĝiaj originoj datiĝas, plej probable, de la jaro 1360<sup>a</sup>. Laŭ unu el la multaj legendoj, la unua kapelo estis starigita en la loko kie iu paŝtisto el *Camporosso* ektravis, kaŝitan en arbeto, etan lignan statuon de Madono kun Infano.

Oni scias, ke en la 16<sup>a</sup> jc. ĝi estis transformita al preĝejo kaj, pli poste, en 1788 al Sanktejo. Fermita, sekve de ordono de la Aŭstria Imperiestro Jozefo la 2<sup>a</sup>, detruita dum la mondmilitoj, rekonstruita kaj rekonsekrita en la nuna jarcento, tiu unu-nava preĝejo plejbelas pro ligna plafono, pentre ornamita per steloj: flanke, du kapeloj estas dediĉitaj al la Sanktuloj Anna kaj Jozefo.

Sur la ĉefaltaro, en la niĉo, staras tiu statueto, el tilia ligno, de Maria kun Jesuo, kies manteloj estis faritaj el cizelitaj kaj ĉizitaj arĝentaj lamenoj. La kronoj, ornamitaj per diverskoloraj ŝtonetoj, surhavas la simblon globon kun kruco. Ĉirkaŭas la kapon de la Virgo aŭreolo kun dekdu steloj. La statuo estas gotikstila verkaĵo de aŭstraj metiistoj.

Pri pliaj detaloj (horaro, kosto, ekveturo...) vi estos informitaj ĝustatempe, sed – jam nun – por plifaciligi la organizajn laborojn, anoncu vin ĉe **TEA**-sekretario. Kvantam oni povas supreniri la monton Lussari preskaŭ dum la tuta jaro, ekskurso tien estas malofta. Kaptu do, la okazon: tio helpos vin kaj nin laŭ diversaj vidpunktoj.

**ANONCO** Mi estas malnova kaj internacie rekonita kolektanto de vizitkartoj. Mi mem ne parolas Esperanton, sed amikoj konsilis provi tiun ĉi informkanalon. Mi nun finverkas studon pri vizitkartoj (historio, ĝenerala kaj nacia trajtoj ktp.), sed la materialo pri la Esperantlingvaj kartoj estas negranda. Ĉu vi povus helpi, sendante vian karton (kaj eĉ superfluaĵn de viaj konatoj, el via tirkesto)?

Denes Botta - Dorottya u. 9 - HU-1051 Budapeŝto

12a Alp-Adria  
Esperanto-Konferenco  
PTUJ - Slovenio  
22a-24a de septembro 2000

Multas kunvenoj kaj kongresoj ĉie tra la tuta mondo, tial elekto malfacilas, sed precipe ni, kaj Vi!, loĝantoj de Alp-Adria regionoj, ne forgesu pri nia ĉiujara renkontiĝo, ĉi-foje en Slovenio, en la urbo Ptuj, Trezorejo de Jarmiloj.

Ĝin organizas **SLOVENIA ESPERANTO-LIGO**, kiu jam nun atendas viajn aliĝojn, por kiel eble plej perfekte plani kaj programi vian agrablan kaj fruktodonan restadon.

Konferenca temo estos:

### TURISMO KAJ ESPERANTO

Jen kelkaj informoj, nur iuj el inter multaj allogaĵoj!

La programo antaŭvidas, krom la komitat-kunsidoj, asembleo kaj laboroj, ankaŭ distran - kulturan - ekskursan partojn. **PTUJ** estas urbo kiu havas miljaran historion: ĝi estis unu-foje menciita (*Poetovio*) de la roma kronikisto *Tacito*, lige kun la elekto de imperiestro Vespaziano en la jaro 69<sup>a</sup>. Ĝi estis gravega transirejo inter la suna Mediteraneo kaj la vasta Panonio kaj inter la Alpaj valoj kaj Balkanio. Ptuj situas je alteco de 232 m. kaj estas ĉirkaŭita de montetoj kun vinber-ejoj, ĉarmaj kasteletoj kaj preĝejoj de pasintaj jarcentoj. Aparte interesaj Ptujaska Gora, la kastelo Borl kaj Palaco Dornava.

Inter la urbaj vidindaĵoj, menciindas: Provinca Muzeo, Dominikana Monaĥejo, pluraj art-galerioj. Kaj, dum la Alp-Adria aranĝo, eblos gustumi, en speciale elektita vinkelo, la famajn vinojn de Ptuj, jam en mezepoko konataj tra tuta Eŭropo. Ilia altkvalita aromo bone harmonias kun la gastro-miaj bongustaĵoj de la stiria kuirarto.

Se ĉio ĉi por vi ŝajnas partopreninda, tuj petu pliajn informojn kaj aliĝilojn al **TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO** - Alp-Adria sekretario.

### El nia Agendo prenu noton pri...

- ✓ Diapozitiva vespero pri **FLOROJ KAJ BESTOJ** - ni ĝuu la Naturon dank' al lertaj fotistoj: Anita, Edvige kaj aliaj!
- ✓ Kultur-gastronomia vespero: frandenda gasto el *Ferrara* kontentigos eĉ la plej pretendemajn!
- ✓ **LA ESPERANTISTO** - pli bone ni konatiĝu kun la frutempa historio de nia lingvo: el la plumo de Zamenhof kaj aliaj pioniraj verkistoj!
- ✓ Esperantista gasto honoros nin per sia vizito: el Kanado Geoffrey **GREATREX**!
- ✓ **KIU KAJ KIE?** - Perdiapozitiva kvizo kun premioj. La celo estas testi vian memorkapablon kaj ankaŭ: ĉu vere la senĉese fluanta tempo tiom ŝanĝas la homojn, ke ili ne plu estas rekoneblaj? Ĉu vi rememoras ankoraŭ iamajn vizititajn lokojn? Kiuj sukcesos, la unuaj kaj plurfoje, respondi ĝuste al la demandoj: kiu? kie? kiam? tiuj ricevos certe belan premion!!!

Parte, inform-artikoloj ŝuldeblas al **RET-INFO**.

BULTENO de la membroj de  
**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**  
Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste  
Tel/fakso: +39 040 763128  
Reto: [esperanto@retecivica.trieste.it](mailto:esperanto@retecivica.trieste.it), [nored@tiscalinet.it](mailto:nored@tiscalinet.it)  
Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio  
Poŝtekkonto N° 10834349